4-a Jaro. N-o 182 APERAS  SEMAJNE 29. Marto 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

Pri la rolo de kelkaj luteranaj sektoj

En la skandinavaj kaj anglo-saksaj landoj la religia demando ofte ludas tre gravan rolon en la ĉiutaga vivo. Tial, ekzemple, en Skandinavio, oni povis vidi, ke la kontraŭreligia luktado antaŭis la ekfloradon de socialista laborista movado. Kaj poste, kiam la luterana eklezio devis konstati, ke la proletaj amasoj, instruitaj per pli ol tridekjara kontraŭreligia propagando, ne plu estas konkereblaj per la samaj rimedoj, ĝi faris al ili cedojn. Sub la instigo de l' ĉefepiskopo de Upsala, Soederblom, modernaj teologoj kreis nov-luteranan religion (neo-luteranismon), kiu neas la inferon kaj akceptas, kun iuj modifoj, la antropocentran koncepton pri dio (t. e. ke dio estas farita por la homoj, kaj ne la homoj por dio).

Sed tiu evoluo de l' luterana kredo oficiala havis pli gravan efikon. Ĝi forprenis al la protestanta eklezio pli ol la duonon de la kreduloj, kiuj kolektiĝis en multnombraj eknaskiĝantaj sektoj. Tiuj sektoj montras kreskantan tendencon. Ke tio ebliĝis, devenas sole el tiu fakto, ke la maldekstraj partioj longan tempon nur kontraŭbatalis la eklezion, sed ne la religion mem.

Ĉiuj tiuj sektoj, idoj de l' protestantismo, batalas inter si mem. La plej ortodoksa estas la metodismo, deveninta de l' anglikana eklezio. Sed ekzistas kelkaj aliaj, nenio malpli ol ortodoksaj: la baptismo, kiu havas kelkajn milionojn da adeptoj en Skandinavio kaj Usono, la Pentekostanoj, kies fideluloj amerikanaj titoliĝas "holy rollers" (la sanktaj ruliĝantoj) kaj kiuj certe estas la plej danĝeraj. Tiuj doktrinoj (se oni tiel povas nomi) venis kun la anglo-saksaj kaj skandinavaj elmigrantoj Usonon kaj havas tie nuntempe la plej multajn anojn. Aliaj sektoj restis pli regionaj kaj lokaj. Ekz. ekzistas ankoraŭ en la ĉirkaŭaĵo de l' urbo Göteborg (nia kongresa urbo) religia komunumo kies konvinkoj pri la praveco de sia doktrino estas tiom enradikiĝintaj, ke ĝi verkis mondkarton, kie sola la urbo Göteborg estas indikita kiel libera de la plena detruiĝo en la tago de l' lasta Juĝo.

La plej danĝera sekto, la Pentekostanoj, adaptis plej lerte sian doktrinon al la bezonoj de l' fideluloj. Ĝi permesas trakti kun dio sur la bazo de egaleco, eĉ familiare. Dio estas amiko, kamarado. Se oni bezonas ion, eĉ tre sensignifan objekton, vi povas ĝin peti al li, ĉu temas pri bifsteko aŭ pri paro da botoj. Dio interesiĝas pri ĉiuj flankoj de l' praktika vivo. Por kontraŭbalanci tiun materian parton de l' doktrino, oni inventis mistikan parton, kiu fondiĝas sur la miraklo de l' Sankta Spirito, aperinta al la apostoloj en Pentekosto. En kunvenoj, virinoj estas tuŝataj de tiu difavoro; ili balbutas nekompreneblan lingvon, kiu devis esti tiu de l' Sankta Spirito. La tuta ĉeestantaro dankas per senformaj krioj por ĝia senmezura boneco. Duonhoron poste, la polico devas konduki tiujn malfeliĉulinojn en frenezulejon.

Dum en Skandinavio kaj Anglio tiuj sektoj, de l' metodismo ĝis la "Kristana Scienco", ne estas sen influo en la publika vivo, en Usono ili estas la estroj. Oni vidis tion en la fama proceso de Dayton (elp. Detn), kie homoj estis kondamnataj, ĉar ili instruis laŭ la tezoj de Darvin.

Juna usona romanverkisto, Sinclair Lewis (elp. Sinkler Luis), direktis en sia romano Elmer Gantri terurajn akuzojn kontraŭ la religiaj sektoj kaj aliaj metodoj en Usono. Ĝi aperis antaŭ unu jaro kaj tuj estis konfiskata en kelkaj usonaj ŝtatoj, kaj kompreneble en ŝtato Masaĉuzets (famiĝinta per la afero Sacco-Vanzetti). Lewis senmaskigas en la persono de Elmer Gantri, nuntempa tipa reprezentanto de l' religia Usono, la amerikan sektaron, en kiu medio la verkisto mem kreskis.

La usonaj sektoj neas la sciencon. Ili kredas laŭlitere al la instruoj de l' biblio. La "Kristana Scienco", fondita antaŭ kvindeko da jaroj de virino, Meri Beker Edi, estas verŝajne la plej riĉa, se ne la plej potenca. La usonanoj nomas ĝin la religio de l' riĉuloj. Ĝi neas la malbonon, sekve ankaŭ la malsanon. Dio, estante bona, kreis ĉion perfekta; nek malbono nek malsano ekzistas. Havante "imagan malsanon", oni do ne alvoku kuraciston, sed "praktikiston" (aŭ "doktoron") de l' Kristana Scienco, kiu, bone pagata por kelkaj konsultoj, faros la neceson por kuraci "la malsanon". Tiu metio de "praktikado" de l' Kristana Scienco estas hodiaŭ en Usono unu el la plej profitigaj.

La ekzemplo de l' Kristana Scienco estis imitata de la aliaj sektoj; ĉar nur religio, kiu povas kuraci malsanojn, havas ŝancojn varbi adeptojn. Ĉiuj usonaj sektoj, ankaŭ la baptismo, praktikas la miraklan sanigadon. Tiel la religio kontentigas ĉiujn bezonojn de l' ĉiutaga vivo.

Sed tio ne sufiĉas por moderna

popolo kiel la usona. Oni inventas pli modernajn metodojn. Oni anoncas publikajn paroladojn pri temoj de furoro: "Se Jesuo vivus ankoraŭ, ĉu li ankaŭ estus ludinta poker-on?" aŭ ankoraŭ: "Ĉu vi kredas, ke dio aprobus, ke vi vestas vin per silkaj ŝtrumpoj, se li hodiaŭ malsuprenvenus al ni?" k. a. La publiko estas pli multnombra ol iam en la usonaj preĝejoj. Por konverti sportantan popolon, ekzistas ankoraŭ aliaj rimedoj. Oni elektas pastrojn, kiuj havas neordinaran fizikan forton, kiuj estas efektivaj atletoj, ludas rugby-on (elp. ragbi) kiel piedpilkon kaj ne ignoras la "noblan arton de l' memdefendo" kiel la boksadon. Vera pastro devas scii interbatiĝi dum siaj rondvojaĝoj.

Sed ne nur sporto kaj kino devas servi al la moderna religio. Oni povas citi multajn okazojn, kie pastroj ĝuantaj esceptan popularecon, trudanstataŭas la lokan policon. Ili vizitas drinkejojn aŭ restoraciojn, fermitajn sekretajn domojn aŭ asociojn, kiuj ial estas konsiderataj kiel kontraŭaj al la instruoj de l' biblio. Ne zorgante pri la polico, nur apogante sin sur la publika opinio ekscitegita, ili elrabadas la meblaron, arestas personojn laŭvole, kiuj malplaĉas al ili kaj metas ilin en malliberejon. Poste oni ilin reliberigas, sed la efiko volita estas produktita: tiu aŭ alia sekto havis sian reklamon.

Kompreneble la libro de Lewis elvokis grandegan indignon en Usono. —

La religiaj sektoj ekzistas same en la sino[1]) de l' katolikismo kiel en ĉiuj aliaj religioj. Sed neniam oni vidis religion tiel praktikatan kiel en Skandinavio kaj Usono, kie la ridindo ligiĝas kun la abomenindo; kie la sento por la praktiko unuiĝas kun la plej pura mistikismo.

[1]) Meze de.

EKZEKUTISTO KAJ VIKTIMO

La faŝismo kaj ĝia sanga ĉefo, Musolini, plenumis novan, teruran krimon, ne malsuperan je malnoblegeco al la mortigo de Mateoti. En la karcero de Peruzo de faŝistaj banditoj torturadis kaj fine fimortigis junan revoluciulon Gastono Sozzi.

Itala elmigrinto, vivanta nun en Parizo, malkovras, kiel komenton al tiu teruraĵo, detalojn pri la intimaj rilatoj de l' iama "socialisto" Musolini al la familio Sozzi. Legante tion, oni komprenos la karakteron kaj la "animon" de l' "nobla duce", el kiu iuj malsaĝigitaj fervoruloj volas fari la "grandan ŝtatgvidanton" de hodiaŭ. Oni komprenos, ke Musolini ĵetus en malliberejon sian propran patron, se tiu vivus hodiaŭ. Lia patro estis unu el la unuaj propagandistoj de l' Internacio kaj estis persekutata de la polico. Ĉiam estis karakteriza por tiu malnoblulo (la filo Musolini) la absoluta manko de ĉiu intelekta kaj morala justemo, kaj la deziro, per ĉiuj rimedoj, en ĉiuj okazoj tenti la fortunon.

Aventuriste li alvenis al socialismo, hazarde trovante lokon ĉe socialista ĵurnalo. Li estis forpelata, revenis, estis en 1909 sekretario de Laborista Ĉambro, kiun li en pli malfrua tempo detruigis kaj forbruligis per siaj "nigraj ĉemizoj". Poste li troviĝis dum jaroj en Forli; revoluciema, li estis kontrolata de l' polico, ribeligis la amason kontraŭ la forveturo de soldatoj al Libio (!).

En tiu tempo Musolini estis gasto kaj amiko de la familio Sozzi. Li ofte vizitis la familion en la vilao de Cezena, kie li estis akceptata fratece. Li tie bone konis la "malgrandan Gastonon", infanon de malvolvita inteligento kaj miriga matureco. Pli ol unu fojon, la



Gastono Sozzi.

nuna diktatoro tenis en siaj brakoj la etulon, sian estontan viktimon, karesis lin, dirante: "li fariĝos bona socialisto!"

Kaj certe, Gastono Sozzi lernis en la proleta, revoluciula avangardo. Li oferis sian universitatan karieron por la studo kaj la luktoj de l' laborista movado. Tre june aliĝinta al la revoluciaj vicoj, li gardis sian lokon batalante ĝis la fino. Li ne fleksiĝis sub la plej kruelegaj torturoj ordonitaj de la sama homo, kiu iam lin ĉirkaŭprenis, antaŭdirante al li estonton de "bona socialisto".

Kia honto kaj kia leciono! Du vivoj, vizaĝo kontraŭ vizaĝo: unu — tiu de Gastono Sozzi, kiu vivis kaj mortis heroe por la afero de l' Proletaro. La alia, tiu de Musolini, plena de perfidoj kaj krimoj en la servo de l' kapitalo, mortiganta unu el siaj malnovaj samkredanoj.



La unua sindikata junulara kongreso en Britio

Tutlanda konferenco de junaj membroj de la brita Sindikato de Butikhelpantoj, Tenejistoj kaj Oficistoj (National Amalgamated Union of Shop Assistants, Warehousemen and Clerks) okazis en Londono 29-an de jan. 1928. Ĉeestis 72 delegitoj el 21 distriktoj. Estis la unua tutlanda konferenco de junaj sindikatanoj en Britio. Depost la milito, pro la daŭra industria krizo, estas malfacile al junuloj ricevi laboron en produktaj metioj; sekve okazas grandega enfluo da junuloj en disvendajn okupojn. La ekspluatado de junaj disvendistoj estas senhonta kaj senskrupula, kaj tre multaj estas maldungataj, tuj kiam ili atingis la 18-an vivjaron.

La konferenca tagordo enhavis 51 punktojn. Iu klopodis malaltigi de 25 ĝis 21 jaroj la aĝlimon por aneco al niaj junulaj sekcioj: sed estas kontraŭleĝe ĉi tie por junuloj ĝis-21-jaraj, havi oficon en sindikato, kaj ĉar oni opiniis, ke 21-vivjara aĝlimo malhelpos nian junulan movadon, tiun proponon oni rifuzis.

Pri la grava aktualaĵo de Organizado, rezolucio estis proponata, ke ĉiu distrikta konsilantaro starigu Junulajn Konsilantarojn por allogi kaj teni junajn laboristojn. Ĉi tiuj konsilantaroj sendu delegitojn al filiaj kaj distriktaj ekzekutivoj. Tiu rezolucio kondamnis la starigon de apartaj junulaj sekcioj, ĉar oni kredas, ke tia organizstrukturo izolos la junajn de la maturaĝaj membroj. La opinioj pri la propono estis diversaj, sed fine oni akceptis la rezolucion, laŭ kiu niaj junaj anoj nun devas labori interne de niaj lokaj filioj kaj ne starigu apartajn sekciojn.

Ili plue petis la C. E. K., ke ĝi enmetu paragrafon en ĉiujn salajr-kontraktojn por limigi la nombron da metilernantoj rilate al plenaĝuloj. La pligrandigo de nia sportmovado estis diskutata, kaj la konferenco decidis klopodi aranĝi ĉiujarajn turnirojn inter niaj distriktaj sportgrupoj.

Oni konsentis peti la C. E. K., ke ĝi ĉiujare kunvenigu tutlandan konferencon de delegitoj el ĉiuj junulaj konsilantaroj. Rezolucion oni malakceptis, kiu proponas, ke ĉiuj junaj membroj havu plenajn anecajn rajtojn kontraŭ

pli malaltaj kotizoj. La leĝo de Britio malpermesas al sindikatoj, ke ili donu plenajn rajtojn al membroj malpli ol 21-jaraj. La konferenco opiniis, ke la registaro devus provizi specialan pagon kaj plenan subtenadon al junaj senlaboruloj.

La konferenco petis la T. U. C. (sindikataran Estaron), ke ĝi starigu specialan fakon por pritrakti junulajn problemojn kaj por organizi tutlandan propagandon.

La konferenco unuvoĉe akceptis la jenan postularon:

1. 40-hora laborsemajno por ĝis-18-jaruloj.
2. Neniaj superhoroj por ĝis-18-jaruloj.
3. Salajroj estu laŭ la Nacia Minimuma Tarifo de la Sindikato.
4. Dusemajna somera libertempo kun plena salajro; plena salajro dum ĉiuj leĝaj (publikaj) libertagoj; plena salajro dum malsaneco.
5. Malstarigo de metilernantaj kontraktoj; sindikata kontrolado de eniro en industrion; ne pli ol unu lernanto kun 3 maturaĝuloj.
6. Plena metia instruado dum laborhoroj.

Spite la kontraŭstaro de la C. E. K.-anoj, la konferenco akceptis la jenan rezolucion: "Estu elektotaj sep komitatanoj kiuj helpos kaj avertos la Centran Ekzekutivon pri la disvolviĝo de la junulara movado en la sindikato."

Tio estas konciza resumo pri longa konferenco, kiu estis tre vigla kaj laborema. Ekster ĉia dubo tiu konferenco instigos la delegitojn labori pli forte por la organizo, kaj donos grandan antaŭenpuŝon al nia junulara movado.

S. H. Brooks (8500).

Letero el Aŭstralio

Mi loĝas en Maryborough (elp. Merbero), urbeto kun proksimume 13 000 loĝantoj, el kiuj 1000 nun estas registritaj senlaboruloj. Ĉiu persono, kiu estas maldungita, sed laboris dum la lastaj ses monatoj, ricevas kompenson de 25 ŝilingoj dum 13 semajnoj kaj 4 ŝil. por ĉiu infano. Ĉiu laboranta persono devas pagi 4 pencojn semajne kiel asekura mono. La senlaboreco estas terure granda en Aŭstralio. Estas 100 000 senlaboruloj en lando de apenaŭ 6 milionoj da homoj, kaj la federala konservativa registaro klopodas alkonduki en tiun staton ankoraŭ pli da homoj, kun la intenco, malaltigi la salajrojn de la laboristoj. En tio ĝi estas helpata de la estraro de l' "Salvation Army" (Sav-Armeo). La neklaskonsciaj laboristoj rigardas siajn laborist-kolegojn kiel malamikojn, precipe, se tiuj lastaj havas pli nigran haŭton ol ili.

El la supraj linioj vi rimarkas, ke ne eĉ ekzistas en Aŭstralio sufiĉe da laboro por la loĝantaro. Tial mi avertas ĉiun, kiu dependas de sia propra laboro, veni ĉi tien.

K-dino A. G. (9625).

El Okcidenta Ukrainio

(Polio)

Por ilustri, kiel malfacilega kaj peniga estas la batalo por la liberigo de la ukrainiaj laborist-amasoj el la jugo de Polio kaj por samtempe karakterizi la severan reĝimon regantan en nia lando, estu citata jena fakto: La ukrainlingva revoluciema gazeto "Svitlo" (Lumo), eldonata ĉe la komenco de l' nuna jaro dum periodo de tri jaroj, aperigis 112 numerojn. Dum tiu mallonga tempo trafis la gazeton tri interrompoj kaŭzitaj de polica interveno. La plej longa el ili daŭris sep monatojn. La redaktorojn oni arestis trifoje. En 1926 la respondeca redaktoro sidis 5 monatojn en malliberejo. El la aperintaj 111 estis konfiskataj 77 numeroj. Entute oni konfiskis 150 artikolojn. Ĉiujn, escepte unu, la juĝo konfirmis.

Pli-malpli sama sorto trafis la organojn de l' kampar-laborista partio (Selrob) — "Naŝe slovo" (Nia vorto) kaj "Naŝe ĵitja" (Nia vivo). Eĉ la Labkamparanan komitaton por helpi al suferantoj pro la superakvego en Galicio la polico severe persekutadas, arestis kelkajn membrojn de l' centra komitato kaj malpermesis la laboron.

M. Ŝpetrik.

LA BENGUELA FERVOJO

La 27-an de novembro 1927, la Benguela (elparolu: Bejngela) fervojo atingis la orientan landlimon de Angola je sia 1241-a kilometro. (Laŭ ĵusa traktado decidita inter belga kaj portugala registaroj, la Angola-Kongolanda landlimo estas transmetota pli orienten, ĝuste ĉe la regiono trairita de la Benguela fervojo. Pro tio ankoraŭ estas konstruotaj 104 kilometroj de tiu fervojo en la aneksigota teritorio).

Ĉi novaĵo, verŝajne neatentinda, estas tamen tre grava por la ekonomia vivo de ĉi-kolonio.

La koncesio je la konstruado kaj ekspluatado de tiu fervojo estis donita la 28-an de novembro 1902, — do, antaŭ ĝuste 25 jaroj — al angla entrepreno, gvidata kaj financata de Robert Williams (Robert Uiljams), fama, speciale en koloniaj metioj, angla financulo. Ties celo estas, atingi la riĉegan pro kuprotavoloj regionon Katanga, kuŝantan proksime de la suda apud-Rodezia landlimo de belga Kongolando, kaj ebligi, por la transportado de la tie elfosita mineralaĵo, pliproksiman vojon al Eŭropo. La antaŭa kaj nuntempa vojo, sekvata de tiu mineralaĵo, estis ĉirkaŭe 4000 kilometroj per fervojo ĝis iu haveno el suda aŭ sudorienta Afriko, kaj certe ne malpli ol 20 tagoj perŝipe laŭlonge de Atlantika Oceano, aŭ de Hindia Oceano kaj Mediteranea Maro, ĝis Belgio aŭ Anglio (ĝustan celon mi ne konas).

La estonta vojo estos sendube tiu tra Angola, ĉar de la nun atingita landlimo al Katanga estas nur ĉ. 500 kilometroj (la tuta longeco de la fervojo estos do 1700—1800 kilometroj) kaj de la Atlantika Angola haveno Lobito (Laŭbitu), kie komencas la fervojo, la marvojaĝo ĝis Eŭropo daŭros dum ne pli ol 15—17 tagoj.

Por la ekonomie malsanega vivo de Angola tiu devojigo tra ĝi de la Katangaj mineralaĵoj estos nedubinde efikplena refortigilo. Cetere la Benguela fervojo, kies unuaj 700 km. jam estas en ekspluatado, trairas tre riĉajn regionojn, kies produktaĵoj estos pli facile transportataj ĝis la oceanbordo, kaj ankaŭ regionojn tre riĉajn, sed ne ankoraŭ ekspluatatajn pro la manko de taŭga transportilo, kaj eĉ ankoraŭ malbone esploratajn pro ilia malproksimeco.

Sed, kion ni tamen vidas?

La urbo Lobito, estonta deponejo de la mineralaĵo el Katanga, estas nur konglomerato el dise metitaj barakoj aŭ budoj el zinko kaj tabuloj. La haveno, longega golfo, kien post du aŭ tri jaroj venos ĉiumonate kelkdekoj da ŝipoj por ricevi la kuprominaĵon, posedas nur unu albordiĝejon pontoforman, konstruitan el ligno, ĉe kiu povas samtempe troviĝi nur du ŝipoj.

Kompreneble, ne multon ni profitos — ni, eŭropaj laboruloj, kaj ni, nigrorasulaj proletoj — el tia plivigligo de la enlanda ekonomio. La leonan parton prenos la koncesiuloj kaj la ŝtato, kiu ne ankoraŭ



Ni antaŭeniras,

sed malrapide, al la kvara milo da abonantoj. Ni plirapidigu la paŝojn.

Ĉe la apero de ĝia ducenta n-o, "S-ulo" havu nepre 4000 abonantojn.

Tio estas ebla, se ĉiu faras sian devon.

(kaj ankoraŭ dumlonge) estas nia, sed de l' riĉegaj koloniuloj (ĉu blank- aŭ nigro-haŭtaj).

Sed tamen, kelkaj el ties konsekvencoj, kiel ekzemple la malapero de l' senlaboreca nebulo, kaŭzata de l' nuna krizostato, kaj verŝajne iom pli da aĉetopovo por nia perlaborita mono, utilas al ni kaj meritas la atentigon pri la fakto.

Samtempe, la inerteco de la registaroj de Angola, kiuj neutile elspezis kaj elspezadas tiom da mono, sed ne kapablis akompani, koncerne al haveno de Lobito, la ja viglan laboron de l' fervojkoncesiuloj, meritas ankaŭ nian severan mallaŭdon. *AFRA.*



El Naturo kaj Scienco

Vivo, vivo, vivo...

Ĝi trapenetras kaj regas ĉiujn objektojn kaj tamen ĉiam malaperas el niaj okuloj. Vivas la homo, suĉbesto, birdo, reptilio, fiŝo, insekto, limako, estaĵoj en ŝlimo de lageto, eĉ vegetaĵo varmiganta sin en radioj de la suno. De vivaĵo plej alta — homo — ĝis plej simpla protozoo en fundo de l' oceano, ĉio spiras, digestas, klopodas, batalas por ekzisti; ĉio vivas per propra maniero; kaj ĉiuj tiuj vivaĵoj prezentas senĉesan, kompaktan, suprenleviĝantan vicon, en kiu ĉiu pli alta membro kreiĝis el la antaŭa per apenaŭ rimarkebla ia perfektiĝo.

Ĉe la plej subaj unuĉelaj kreaĵoj ŝajne ĉesas la Vivo; "kie ne ekzistas ĉelo protoplasma, ne ekzistas ankaŭ la vivo", oni lernigis niajn gepatrojn.

Sed la sciencaj esploroj lastjaraj fortigis tiujn asertojn en la regnon de malveroj. Hodiaŭ ni ja scias, ke ĉio estas vivanta, ĉio — mi diras, — ĉu la mineralo, ŝtono, metalo, akvo aŭ aero. Niaj neperfektaj sentoj ne kapablas certe ankoraŭ percepti tiujn bagatelajn, kvazaŭ latentajn (kaŝajn) elmontrojn de vivo en regno minerala. Tio estas tasko por estonto.

Sed spite tio ni scias kaj sentas almenaŭ, ke ni ne estas specialaĵo en la kadro de l' naturo. En la naturo regas unueco. La materio substance estas la sama, kvankam ĝi montriĝas milionforme; ankaŭ la energio, estranta ĝin, estas substance la sama, spite tio ke ni ekkonas ĝin kiel lumon, kiel elektron aŭ koherecon aŭ aliel. Kaj la materio videbla ne estas io alia ol palpebla nodo de kosma energi-ondado, unu formo de Forto, nenio plu. Maha maja — granda trompo nomas tion la hindaj okultaj pensuloj.

Ni vivas per Forto, per ĝi vivas ankaŭ ĉiuj aliaj atomoj de l' Materio en la kosmo. Kaj ĉar ĉion vivantan regas nur unu senlima, nehaltigebla leĝo: — leĝo de Evoluo — tial laŭvice ĉiuj pli malsupraj formoj de absoluta vivo materia atingos la formojn pli altajn! Kaj estas eble al ni, konsiderantaj nin plej perfektaj vivaĵoj sur Tero, vidi en tiuj formoj pli subaj nian propran estintecon, vojon, tra kiu ankaŭ ni venis!...

Tial do interesas nin tiom ĉiu skarabeto, ĉiu branĉeto de arbo, ŝtono, ĉiu vivaĵriĉa akvofluo. En tio ni ekkonas la naturon kaj ĉiujn leĝojn de ĝia Evoluo, por apliki ilin al niaj propraj celadoj.

La evoluo al pli bono estas ja impulso ne nur de la naturo, sed ankaŭ de la homara historio, kaj ĝuste la kredo al ĝi estigis la celadon al Socialismo.

El gaz. "Laborista Klerigo" trad. Lujak.



Al kiu apartenas la estonto?

La estonto apartenas al tiu, kiu havas plej multe da nafto — diras la kapitalistoj kaj devigas la scienculojn elkalkuli la proprajn naftajn riĉaĵojn kaj tiujn de aliaj landoj.

Laŭ usonaj sciigoj la tutmonda naftprovizo estas proksimume iom pli ol 9 miliardoj da tunoj. La plej riĉa lando estas Usono, havanta ĉ. unu miliardon, kaj Sovetio havas nur 860 milionojn da tunoj. Sed, kiel montras la lastaj sciencaj esploroj, la provizo da nafto en Sovetio estas pli granda kaj egalas proksimume al du kaj duono da miliardoj da tunoj:

Laŭ regionoj	en milionoj da tunoj	%
Baku	1442,6	50,1
Groznij	890,0	31,3
Kubanj	65,6	2,3
Zakaŭkazje	32,8	1,1
Uralo	262,4	9,1
Uĥta	32,8	1,1
Zakaspij	32,8	1,1
Fergana	16,4	0,6
Saĥalin	98,4	3,4

Sekve la plej riĉa lando laŭ nafta provizo estas Sovetio. Ĝi povas kontraŭstari kapitalistan landon. Aldonu vi al tiu ĉi riĉaĵo la sovetan reĝimon, kaj vi komprenos la malamon de Ĉemberlenoj kaj ĉemberlenanoj.

(3409)

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo dekoka)

Kvankam la Romana Imperio estis grandega, ĝi tamen reprezentis nur malgrandan parton el la Tero. Ĉe la limoj, Alamanoj, Frankoj, Gotoj, Skitoj, Partoj k. a. Barbaroj senĉese provis invadi kaj kelkfoje sukcesis. El tio oni devas konkludi, ke paco kaj ordo povos definitive regi nur kiam ekzistos politika mondunueco.

La fakto, ke la Imperio kunligis kaj unuecigis multajn popolojn, kiuj antaŭe interbatalis, kreis objektivan kondiĉon por ke povu estiĝi kosmopolitisma ideologio.

La senpatriotismo de kelkaj grekaj filozofoj ja ne povus naskiĝi, se ne jam ekzistus la imperio de Aleksandro. Similan fakton ni konstatas ĉe la ekzisto de la Romana Imperio. La unuaj kristanoj estis ankaŭ sennacianoj. Sankta Paŭlo, la vera fondinto de l' katolikismo, apartenis al la ekspluatata klaso kaj estis Romana civitano. Tiun civitanecon li cetere malkonfesis: "Ni ne havas civiton, ni atendas tiun, kiu devas stariĝi," deklaris la unuaj kristanoj.

Ili atendis la "Civiton de Dio", kiu ampleksos ĉiujn popolojn, ĉiujn rasojn, la tutan mondon; ili sopiris al la civito, kie forestos sklavoj, riĉuloj kaj malriĉuloj, kie estos nur egaluloj, fratoj. Bedaŭrinde la forfalo de l' Romana Imperio detruis la materian bazon, por ke tia ideologio povu esti alio ol revo.

Dum tri jarcentoj, la kristanoj estis konsiderataj kiel revolucianoj, kiuj danĝerigas la sociordon, kaj pro tio ili estis persekutataj. Sed dum tiu longa tempo, iliaj gvidantoj, la episkopoj, akiris aŭtoritaton kaj sufiĉe bonan pozicion. Unu lerta imperiestro, Konstanteno, komprenis, ke la kristana religio, kiel la aliaj, povas esti ankaŭ helpilo por la regado. Li ĉesigis la persekutojn kaj eĉ subtenis la novan religion. De tiu tempo la kristanismo tute perdis sian dekomencan karakteron kaj fariĝis nova trompilo por servutigi la popolon.

Tamen la katolikismo ankoraŭ nuntempe celas tutmondan spiritan superregadon, kaj la lertaj apologiistoj per belaj frazoj sukcesas akordigi la kulton al la patrio, t. e. al nacieca religio, kun la kulto al unu sola universala dio. La "Civito de Dio" ekzistas en la transmondo; ĉiu bona, obeema kredulo ĝuos postmortan feliĉon. Dume li devas elporti ĉiujn surterajn maljustaĵojn...

La forfalo de la Romana Imperio metis en la historion, dum 1000 jaroj, nigran makulon. Sed en la 14-a jarcento reviviĝis en Italio la antikva kulturo. Ekfloris la movado nomita Renesanco, kiu venke disvastiĝis tra tuta Eŭropo. De tiu tempo la homaro rekomencis sian antaŭeniradon al senĉesa pligrandiĝo de la politikaj unuoj.

La historio de la modernaj tempoj estas sufiĉe konata, tial mi ne priparolos la longajn, sangajn batalojn, per kiuj stariĝis la nuntempaj politikaj unuoj, kiujn oni nomas nacioj. Ni prefere tuj transiru al la ekzameno de la moderna patriotismo. E. Lanti.

(Pluo sekvos.)

TAGO EL MIA VIVO

Mi naskiĝis en la urbo Kiev. Mia familio konsistas el patro, patrino, tri fratoj kaj du fratinoj. Mi estas 24-jara laboristo kaj laboras en la ŝtata eldonejo de Ukrainio. Mi ricevas monate 63 rublojn, laboras 8 horojn kaj havas en jaro unumonatan libertempon, dum kiu mi restadas senpage en ripozdomo.



Mia tago pasas tiele: Ĉiumatene mi vekiĝas je la 5.20 h. Jam de la 5-a mia patrino ekbruligas la fornon, preparante por mi teon kaj matenmanĝon. Trinkinte kaj manĝinte mi foriras je la 6.20 h. al la laborejo.

La ŝtata eldonejo de Ukrainio presas milionojn da lernolibroj por lernejoj. Niajn librojn oni trovas en ĉiuj urboj de Sovetio.

La laboro finiĝas je la 15-a horo, kaj mi iras hejmen, kie mi post 15 minutoj tagmanĝas kun miaj gepatroj. Dimanĉe mi ne laboras, sed promenas kun miaj Gek-doj kaj vizitas teatron aŭ kinematografon.

Mirono-Ler (9082).



KELKAJ MEMORAĴOJ

Mi naskiĝis kaj vivadis dum la tuta vivo inter laboristoj, kaj pro tio mi nature ĉiam estis malriĉulo. Kiam mi estis 12-jarulo, mia patro mortis, kaj mi daŭre suferis pro malriĉeco, malsano kaj senlaboreco. En la jaro 1887, kiam mi ne povis trovi okupon, mi dormadis eksterdome multajn noktojn. En novembro de tiu sama jaro oni ekzekutis la tiel nomatajn anarkistojn en Ĉikago. Ili apartenis al la sama granda laborista unuiĝo kiel mi, la "Knights of Labor" (Kavaliroj de Laboro). Iun nokton, kiam mi dormadis en fervoja vagono ŝarĝita per maizo, oni arestis min, kaj ĉar mi portis en la poŝo mian membrokarton, la juĝisto enkarcerigis min por la plena tempo, kiun la leĝo permesis. Dum la tempo de l' aresto mi estis tre dormema, ĉar mi estis pasiginta la antaŭan nokton en arbaro apud la rivero Misuri, ne malproksime de Kansas City, kie oni faris grandan ponton. Laboristoj tie laboradis 25 metrojn sub la surfaco de la akvo en kunpremita aero, kaj en la momento, kiam mi alvenis tien por serĉi laboron, oni eltiris laboriston mortintan. Post la nokto en la arbaro mi revenis al la urbo, kaj dum la tuta tago mi serĉadis okupon sensukcese. En la sekvanta nokto mi trovis — — areston, batadon kaj malliberejon. Dum la tuta jaro 1887 mi suferadis multe, kaj mi sciiĝis, ke ne nur mi estas malbona kaj malsana, sed la tuta socio, en kiu ni vivas. De tiu tempo ĝis nun mi provas plibonigi ĝin ĉiel ajn.

Dum tiu sama jaro esperanto naskiĝis en Polio, sed tiam mi nenion sciis pri ĝi. Ĉirkaŭ la jaro 1896 mi aŭdis pri Volapük, sed mi nek lernis nek ŝatis ĝin. Ĉirkaŭ la jaro 1900, post longa studado, mi fariĝis socialisto. Tiam mi estis plene konvinkita, ke estas necese batali la kapitalistaron ne nacie, sed internacie, kaj ke por fari tion la laboristoj tre bezonas mondlingvon. Ankoraŭ mi nur revadis, ne sciante pri la progreso de esp. en Eŭropo.

Ŝanĝiĝas la scenejo. Dum kelkaj jaroj mi studadis la hispanan lingvon, pensante, ke devas ekzisti pli da amikeco inter la laboristoj de la hispanlingvaj respublikoj kaj tiuj de Usono. En la jaro 1905 mi troviĝis en la urbo Gvadalaharo, Meksikio. Mi legis en ĵurnalo, ke la esperantistoj baldaŭ havos en Francio sian unuan internacian kongreson. Tiam mi memoris, ke dum la tuta historio neniu mondlingva movado estis sukcesinta okazigi internacian kongreson. Mi pensis: "Esperanto estos la mondlingvo, kiun la Laboristaro tiom bezonas. Mi lernos ĝin." Tial mi komencis serĉi librojn en la librejoj de tiu urbo, sed ne trovis ilin. Poste mi serĉis denove, kaj en granda librejo oni diris al mi, ke laŭ nova katalogo ekzistas lernolibro en Meksiko, ĉefurbo de la respubliko, kaj ke ĝi venas el Hispanio. Ili mendis tri ekzemplerojn, kaj mi aĉetis du el ili. Unu mi vendis al hispano, kiu studadis anglan lingvon kun mi. Ĉar mi ne povis gajni sufiĉe per mia laboro, mi instruadis anglan lingvon nokte. Per tiu hispanlingva lernolibro mi studadis sole dum jaro kaj tiam komencis korespondadi.

Ŝajnas ke la alia semo, la tria libro, falis en bonan teron, ĉar poste naskiĝis en Gvadalaharo la Okcidenta Esp-ista Societo, nacia organizo. Sed ĝi detruiĝis dum la revolucio. Mi estis ano dum tri jaroj. Ĝia oficiala organo estis la "Esperanta Gazeto". Dum la tri jaroj mi vojaĝadis sufiĉe en tiu lando kaj instruis nian lingvon al multaj komencantoj. De la jaro 1910, kaj dum la sekvantaj jaroj, nenia kultura movado povis funkcii, ĉar la lukto komenciĝis sur la milita kaj ekonomia kampoj.

La ĉefa tasko por la laboristoj en la tuta mondo estas, rompi la povegon de la kapitalistoj, forigi la tutan sistemon kaj restarigi la socion laŭ nova bazo, tiu de la regado de la Laboristaro mem. Por fari tion, estas necese agi mondskale. Antaŭ ĉio estas necese akiri influon sur la ekonomia kampo, pli speciale en la fakoj de la produktado de militmaterialoj, kaj la transportado surtera kaj surmara. Por fari tion, oni devas uzi la telefonon, la telegrafon, la radion kaj la mondlingvon esperanto. La gejunuloj inter la klaskonsciuloj revoluciemaj nepre devas lerni lerte uzi tiujn ilojn. Por nia celo esp. jam estas tre utila ilo, kaj la kapitalistoj komencas kompreni tion. Pro tio ili helpas aliajn mondlingvajn projektojn, sed ne la nian. Ni devas gardi la lingvon kaj ĉiam uzi ĝin por la progresigo de la Laboristaro.

Mi bedaŭras diri, ke mi vidas multajn gefilojn de revoluciemaj laboristoj, kiuj jam havas la kapon plenan je kapitalistaj ideoj. En kriza tempo ili estos ĉe la flanko de la malamiko. Ili batalos kontraŭ la gepatroj mem. Esperanto donu al ili pli larĝan vidpunkton. Instruu al ili la klasbatalon kaj la mondlingvon esperanto.

J. M. Kerr.



Honorado — anstataŭ salajro

de Kastelano (601)

Melodio laŭ malnova, germana popolkanto: "Mariechen sass träumend im Garten..."

Maljuna ministo laboris
Multjare por kapitalist'.
Dumvive li multe suferis
Pro zorgoj pri viva ekzist'.
:;: Ĉar la profit'-sistemo
Ja pagas al prolet'
Salajron por vivado,
Nur kiel por asket'. :;:

Li ĉiam nur aŭdis mallaŭdon
Dum sia penega labor'.
Neniam laboris sufiĉe
Li malgraŭ persist' kaj fervor'.
:;: Eĉ dum maljuna aĝo, —
— Malsana kaj sen fort', —
Li estis subpremata,
Ĝis savis lin la mort'. :;:

Sed kiam lin prenis la morto
Ŝanĝiĝis nun tuj la afer'.
De ĉiuj li estis laŭdata
Nun kiel plej brava sur ter'.
:;: Subite li fariĝis
Plej taŭga laborul', —
La sama, kiu estis
Dum vivo vera nul'. :;:

Ĉe tombo multkostaj florkronoj,
Standardoj, muziko, kantad',
Sinjoroj kun altaj ĉapeloj,
Ministoj en brila parad'.
:;: Jen, — la proleta sorto:
Dum vivo nur labor',
Kaj poste rekompence
Ĉe tombo grandhonor'. :;:

Nun diru: Ĉu devas restadi
Ĉi tiu mondord' sur la ter',
Ke homoj kun ega laboro
Vivadas en granda mizer'?
:;: Ne, — certe ne, — kunuloj,
Nur iom da pensem', —
Kaj baldaŭ ekforestos
Ĉi eksplua'-sistem'. :;:

TRA ESPERANTIO

Kion vi kantas?

Kantoj ĝojigas, kunligas la homojn. Revoluciaj kantoj kuraĝigas. Per kantoj ni lernas la lingvon. La kurslernantoj ŝatas dum instruado lerni kantojn. Estas plaĉa maniero de lernado. En Sovetio ĉiu klubo havas sian kantrondeton. En Germanio la migranta junularo ne estas imagebla sen komuna kantado. En Francio oni ĉe amasoj malmulte kaj malbele kantas. Sed tiu cirkonstanco ne malhelpas, ke inter la SAT-anoj de Parizo ekzistas multaj kantemuloj, kiuj dum kelka tempo kunvenis ĉe K-dino, por eklerni esp. kantojn laŭ nia bela "Proletaria Kantaro"[1]).

Ni faris diversajn spertojn, kiujn ni sciigas al vi per "S-ulo", kun la celo instigi vin, ankaŭ fondi kant-rondetojn en viaj grupoj. Atinginde estas, ke ni povu kanti ĝis la proksima Kongreso, K-doj el multaj landoj, sendiference kaj unuece, kelkajn kantojn. En melodio kaj kantmaniero ni kelkfoje trovis diferencon kontraŭ la origina formo de devenlando. Sed tio tute ne gravas. Ni lernu precize laŭ la "Pr. Kantaro" por havi unuecon en la komuna kantado.

Ni nun citas la kantojn, kiujn ni studis en Parizo: N-o 2, La Internacio; n-o 3, Ruĝgardista marŝo; n-o 10, La Proletarioj (samritmo de muziko kaj paroloj perfekta); n-o 14, Forĝistoj ni (gaja kaj marŝritma); n-o 17, La ruĝa gvardio (energia, bela rekantaĵo); n-o 20, Gejunulara ĵurkanto (perfekte ritma); n-o 21, Varŝavjanka (la muziko ne la origina; kantu akurate, kiel skribite. Atentu, por bone apliki parolojn de la lastaj strofoj); n-o 23, Ventegoj hurlu ĉirkaŭ ni (laŭ muziko de Ŝubert, forta melodio, tre bona samritma teksto); n-o 25, Dubinuŝka (belega rusa kanteto; mankas, kiel ĉie, indiko de rapideco, de nuancoj. En P. ni, malgraŭ klopodegoj, ofte kantadas tro rapide rusajn kaj germanajn kantetojn); n-o 26, Kremla Sonorado tre plaĉis ĉi tie. Paroloj kaj melodio bone samritmas. Tradukinda en naciajn lingvojn); n-o 30, Revolucio (banala melodio por tiom belaj vortoj); n-o 32, El la kamparana milito 1525 (belega, terura melodio, popolnaskita); n-o 33, Funebra marŝo; n-o 74, La Karmanjolo (1924). La "Marseljezo"n (n-oj 5/7) ni nuntempe en Francio ne povas ŝati, ĉar ĝi estas la himno de la naciistoj.

Jen ĉio, kion ni studis ĝis nun. Mi ankaŭ rimarkis "Ruĝarmeaniĝo"n, ĉar tre pentrinda, malnov-forma kaj kun junega senco, sed ni ne havis okazon, lerni ĝin.

Nun mi demandas ĉiulandajn K-dojn: Kiujn kantojn vi kantas esperante? Ĉu ni povos kune kantadi dum kongresoj? Kion vi konsilas pri tio?

J. F. Vincent (7359).

[1]) Vidu anoncon en tiu ĉi n-o.

El la Administrejo

Tro malfrue

La Jarlibro estas jam parte presita, kaj post kelkaj semajnoj ni certe povos ekspedi ĝin. Tamen la alfluo de la "Demandiloj", kiujn ni dissendis kun la Jarlibro pasintjara, daŭras. Certe ni notas la diversajn punktojn sur la slipojn de la membroj por utiligi ilin en la sekvontjara Jarlibro. Sed oni ne kvazaŭ postulu, ke tiuj informoj nepre aperu en la nunjara Jarlibro. Estas ne eble pro la supre citita kaŭzo. Necesas, ke la membroj pli rapide resendu siajn "Demandilojn" ol dum la pasinta jaro. Tiam la laboro en la administrejo ankaŭ pli dividiĝas, kaj ne ĉiu laboro koncentriĝas dum la vintraj monatoj, dum kiuj ni estas tro okupitaj. Adresoj de la membroj ankoraŭ povos aperi en la "Suplementa parto" de la Jarlibro, se la K-doj tuj post ricevo de tiu ĉi numero sendas la kotizojn. Do, rapidu, la tempo urĝas!

Certe nian tro-okupitecon en la administrejo ankaŭ rimarkis niaj K-doj rilate la korespondadon. Ne eblis, kiel kutime, rapide respondi la plej diversajn demandojn, ĉar, kiel jam dirite, pro troa laboro ni ne povis, kaj pro tio ni petas pardonon. Certe, kiam la Jarlibro estos ekspedita, ni trovos pli da tempo por respondi kiel kutime.

Kelkaj K-doj demandis, kial ili ne jam ricevis la protokolon de Lyona Kongreso. Ni respondu, ke pasintjare ne aperis citita protokolo aparte, sed en la paĝoj de "S-ulo". La kaso ne permesis apartan eldonon: la kotizo ja apenaŭ sufiĉas por la kostoj de la Jarlibro.

Adm.

GRANDA KONGRESAFIŜO

trikolora

aperis por varbi al nia 8-a Kongreso en Göteborg

ĈIU PROPAGANDISTO tuj havigu al si senpage per la Kongr. Komitato, Box 73, Göteborg.

8-a Kongreso de SAT en Göteborg (Svedio)

(14—19. aŭgusto 1928)

Ĉion, kio rilatas al la kongreso adresu al: *Einar Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.*

7-a komuniko

Pasportoj kaj vizoj. Por ke ĉiu sciu, ĉu li bezonas vizon kaj kiom ĝi kostas, la Kongr. Komitato turnis sin al la ministerio por eksterl. aferoj kaj ricevis sekvantajn sciigojn: La vizoj por envojaĝi Svedion kostas por — Argentino, sv. kr. 10 (2½ dol.), Brazilio 8 (2 dol.), Bulgario 7 (1,80 dol.), Estonio kaj Finnlando 4 (40 fmk.), Grekio 7 (1,80 dol.), Ĉinio 8 (2 dol.), Latvio 7 (1,80 dol.), Litovio 1,85 (½ dol.), Polio 7 (1,80 dol.), Rumanio 11 (2⅔ dol.), Sovetio 21 (11 rbl.), Ĉeĥoslov. 7 (75 ĉkr.), Turkio 10 (2½ dol.), Hungario 5 (1,25 dol.). Por usonanoj kaj danciganoj la vizo estas senkosta.

Neniun vizon ĉe sveda ambasadorejo bezonas civitanoj el jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Danio, Francio, Germanio, Italio, Japanio, Nederlando, Norvegio, Portugalio, Hispanio, Svisio, Angla Imperio (escepte britaj civitanoj el Hindio, Malto kaj Gibraltaro, kiuj bezonas vizon; ĝi kostas 9 sv. kr.). Civitanoj el tiuj landoj nur bezonas la pasporton de sia registaro. Atentu: La ciferoj en dolaroj ktp. ne estas precizaj, sed nur proksimumaj.

Fervojista Fakkunsido. K-do Nathans proponas, ke oni diskutu: "Kiamaniere praktike servigi la helplingvon al la intern. agado de l' laborista movado" kaj "Kiel ni favoros plej bone la enkondukon de esp. en la laboron de nia intern. sindikata movado". Eble ITF (Intern. Transportlab. Feder.) sendos delegitojn.

Norda Vojaĝoficejo havas filiojn en Kopenhago, Amagertoro 24, kaj en Parizo, 28 bis, Avenue de l' Opéra. Tie la K-doj ricevas ĉiuspecajn sciigojn pri la vojaĝo al Svedio.

La 4-a listo de aliĝintoj

116. Klara W. Halvarsson, Kiruna, Svedio . . . .
117. Martin Stöckel, Innsbruck, Aŭstr. 6826
118. Anna Medvedeva, Iv. Voznesensk, Sovetio 6321
119. Olga Alaŭdina, Iv. Voznesensk, Sovetio 6162
120. Gust. Jönsson, Hällefors, Svedio 4087
121. Gunnar Torstensson, Göteborg, Svedio 8008
122. Nikolao Korjakovcev, Krasoufimsk, Sovetio 6984
123. Valentino Korjakovcev, Kungar, Sovetio 7648
124. Stefano Michalicka, Pavlovo-Posad, Sovetio 1187

125. Vilma Michalicka, Pavlovo-Posad, Sovetio 1311
126. Martin Dahlin, Örtofta, Svedio .
127. Karl Fridental, Klinci, Sovetio . 7325
128. Evert Larsson, Göteborg, Svedio
129. Henri Schjerve, Trondhjem, Nor- 6462
130. Sigurd Pettersson, Trondhjem, Norvegio 7723
131. Edvard Lundin, Ludvika, Svedio —
132. Josef Zink, Wien, Aŭstrio . . . 9437
133. Emerich Essler, Wien, Aŭstrio 10 764
134. Aleksio Ŝuvajev, Niĵnij-Novgorod, Sovetio 7652
135. Viktoro Belogorcev, Nikolaev, Sovetio 7495
136. Vladimir Baĵenov, Ĉita, Siberio Sovetio 1367
137. Georg Harnisch, Burkhardtsdorf, Germanio 8285
138. Rudolf Schubert, Leipzig, Germ. 6727
139. Richard Schinkel, Leipzig, Germ. 135
140. Ivano Zubko, Poltava, Sovetio —
141. Stefano Kajaniko, Poltava, Sov. —
142. Mario Butnik, Poltava, Sovetio —
143. Polino Ĉubova, Poltava, Sovetio —
144. Mikaelo Lazko, Poltava, Sovetio 10 550
145. Kadino Lazko, Poltava, Sovetio —
146. Hedvigo Bistrova, Poltava, Sov. 10 548
147. K-do Bistrova, Poltava, Sovetio —
148. Elin Grandin, Göteborg, Svedio —
149. Julius Johnsson, Usono . . . . —
150. Werner Haage, Stuttgart, Germ. 10 933

Samara Distrikta Kongreso de Profunuiĝo de fervojistoj

aŭskultis kun sincera ĝojo la salutojn, ricevitajn de K-doj-esperantistoj. En sia respondletero la distrikta komitato esprimas sian kontentecon pri tutmondaj interrilatoj akiritaj per esp. Ĝi havas la konvinkon, ke kun subteno de la tutmonda Proletaro en Sovetio la malfacila konstruado de socialismo estos plenumita. La kunligo per esp. ne estu okaza, sed daŭra. En la nomo de 13 056 organizitaj ĝiaj membroj ĝi sendas al ĉiuj gelaboruloj k-dajn salutojn kaj dezirojn por sukceso en batalo por laboristaj rajtoj.

KONGRESO DE ANARKISTA JUNULARA INTERNACIO

okazos 9.—10. majo 1928 en Huizen (Nederlando). Post raportoj de l' sekretario kaj de la delegitoj okazos paroladoj pri militarismo, kapitalismo kaj organizaj demandoj. Oni fiksos "principklarigon", per kiu A. J. I. akceptas ĉiujn rimedojn por neniigi la malhelpantajn faktorojn en la homa kleriga laboro, kiel ŝtaton, kapitalismon, militarismon, lernejon kaj religion.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Hungario. — Antaŭ kelkaj semajnoj fondiĝis Federacio de Hungariaj Lab. Kulturunuiĝoj, al kiuj apartenas ĉiuj lab. kulturorganizoj de Hungario. La nove fondita Federacio havas en sia statuto paragrafon pri tio, ke ĝia oficiala lingvo eksterlanden estas esp-o. Per ĉi tiu decido ni finis etapon de nia agitado: Unu el la plej gravaj institutoj de la Laboristaro uzas nur esp-on en siaj eksterl. interrilatoj, k. per tio nia lingvo fariĝis ankaŭ la oficiala lingvo de ĉiuj kultursocietoj. Sidejo de la Federacio estas: Budapest, VII. Kertész-u. 22-24. Szakszervezeti Tanács por Munkáskulturegyesületek Szövetsége. — La jarkunveno de hungara sekcio de Turista Societo Naturamikoj rezoluciis, proponi al la kongreso de la societo dum somero 1928 en Zürich, ke ĝi rekomendu al siaj membroj la lernadon de esp-o, al siaj grupoj stariĝon de esp. kursoj k. sekcioj, interrilaton kun alilandaj grupoj nur per esp-o, k. petu la redaktoron de "Naturfreund" (naturamiko), en la gazeto malfermi konstantan esp-o-rubrikon. — Hung. Esp. Soc. Lab. — **Norvegio.** — Trondhjem. La esp-o-grupo okazigis de 17.—24. febr. grandan ekspozicion en Popoldomo. Pli ol 1000 pers. vizitis ĝin; ni disdonis flugfoliojn k. gazetojn (norv. "Lab. Esp-isto"). La lab. tagĵurnaloj tre favore raportis pri esp-o k. la ekspoz. 2 novaj kursoj preparataj. (6462.) — **Sovetio.** — Polock. Esp. laboro komenciĝis nur fine de 1927. La loka gazeto nun regule aperigas priesp. art. 2 rondetoj ĉe lernejoj kun 38 lern., kiuj interkoresp. kun germ. lernejoj. Esp. rondo ĉe instruistoj, el kiuj 11 varbitaj por SEU, 2 por SAT. — Veliĵ. Dum 10-jara ruĝarmea festo de urba soveto estis legataj salutlet. de Aŭstrio k. Germ. (Wien, Leipzig, Herne), kiuj elvokis grandan entuziasmon k. estis respondataj. (Ŝustickij.) — Kiev. — En nov. Kievon vizitis du eksterl. SAT-anoj K-doj Salan (Nîmes), kaj Sons (Londono). Kelkloke ili parolis esp-e antaŭ multnombra publiko. K-do Salan faris Radio-paroladon el Radio-studejo de Kieva Intersindikata Komitato. — Nova grupo ĉe Klubo de presistoj. Gvidas K-do Viktorov-Ĉeĥoviĉ. — Komencante de 16. jan. Radio-Studejo de Kieva Intersindikata Komit. ĉiulunde disaŭdigas esp-o-kurson. Gvid. K-do Fedotov. — 27. jan. 28. La Intersindikata Komitato dissendis al ĉiuj lokaj sindikatoj cirkuleron, sciigantan pri fondo de Esp-o-Konsultejo, rekomendantan subteni esp-o-rondetojn k. provizi klubajn bibliotekojn per esp. literaturo. — SAT-aniĝis kiel organizo redakcio de loka junkomunista gazeto "Juna Bolŝeviko". (728.)

La Lingva Angulo

Demandoj.

1. Kiu formo estas ĝusta: a) Mi lernas la lingvon esperant**o** aŭ: Mi lernas la lingvon esperant**on**? b) Mi vidas laboriston komunist**o** aŭ: Mi vidas laboriston komunist**on**?

2. Kion signifas "horti"? (1187.)

3. Ĉu oni povas diri ŝukremo?

4. Ĉu mi uzu pfenigo aŭ fenigo? (90.)

Respondoj.

1. a) Laŭ "Fruictier, Esp. Sintakso" (pĝ. 14, art. 42) ambaŭ formoj estas uzataj kaj korektaj. Ni rekomendas la uzadon de la unua formo: Mi lernas la lingvon esperant**o**, subkomprenante: Mi lernas la lingvon nomatan esperant**o**. b) Nek unu nek la alia formo uzindaj (la unua erara). Malĝusta esprimmaniero. Korekte estas: Mi vidas laboriston komunist**an** aŭ: Mi vidas laboriston, kiu estas komunisto.

2. La vorto "horti" estas malnecesa neologismo, kiu havas sencon de "varti" (infanojn). "Horto" = vartejo por infanoj.

3. Vi devas diri ŝuŝmiraĵo. Kremo estas laktaĵo.

4. Ni konsilas uzi la formon fenigo. Bedaŭrinde el naciista vidpunkto precipe germanoj trudas la formon pfenigo, kiu estas foriginda. Se vi parolas pri germana aŭ finnlanda fenigo, vi simple aldonas la rilatan adjektivon.

Interimo.

NE FORGESU SENDI UNUAMAJAN SALUTON!

Ĉita'a SAT-anaro kore petas esp. laboristojn sendi kolektivajn salutleterojn kaj klopodi ĉe siaj organizoj (partiaj, profesiaj kaj a.), ke tiuj ankaŭ sendu salutleterojn, **por la Unua Majo al la Laboristaro de Ekstrem-Orienta Siberio,** kaj al ties org. regionaj kaj distriktaj: Intersindikata Komitato, Komitatoj de Kompartio, Komjunularo, IRH, Junpioniroj, al Asocioj de Prolet-verkistoj, sendiuloj, sportuloj. Oni sendu la salutojn kiel eble plej frue laŭ la adreso: **Ĉita, (Siberio), poŝtkesto n-o 1, por...**

Lab.-korespondantoj kaj redakcilaborantoj!

Instigu lab.kor.ojn kaj redakciojn de viaj ĵurnaloj sendi por la Tago de la Gazetaro (5. majo 1928) salutojn al la jenaj sovetiaj tagĵurnaloj kaj ties lab.-korespondantaro: Transbajkala Laboristo (Ĉita), Pacifik-Oceana Stelo (Ĥabarovsk), Burjat-Mongola Vero (Verĥneudinsk). Ĉion adresu: **Ĉita (Siberio) poŝtkesto n-o 1,** por (nomo de la ĵurnalo).

En neniu nacia lingvo
estas eldonita
tiel riĉenhava, laŭ internacia vidpunkto, kolekto de revoluciaj kantoj, kia prezentiĝas en la

PROLETARIA KANTARO

aperinta ĉe Eldon-Kooperativo de SAT. Ĝi enhavas 74 kantojn laboristajn el 22 malsamaj naciaj lingvoj. Kun muziknotoj. Zorge presita.

Prezo: 2.50 mk. g.

Havebla ĉe: **Administrejo de SAT, R. Lerchner, Colmstr. 1. Leipzig O 27.**

Al K-do Tvortkoviĉ (8900)!

Ĵus ni ricevis vivosignon pri vi de K-do 4548 kaj ĝojas, ke vi ĝustatempe konsciiĝis, kiel ne devas agi SAT-anorevoluciulo. Saluton kaj bonfarton!
SAT-grupo, Mannheim (972).

ATENTU SOVETIANOJ!

Por la propagando de regnobaloto ni bezonas argumentojn por refuti burĝajn kalumniojn. Skribu kiujn avantaĝojn vi ĝuas nun k. dum la cara epoko. — Skribu multnombre, presigu ĉi-anoncon en viaj ĵurnaloj. Vi ankaŭ povas skribi germ. k. france. Ĉiu ricevos resp. Adr.:

Chr. Schneider (jun.), Oberbetschdorf,
Bas-Rhin (Francio).

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":
Le Matérialiste, Bruxelles, feb., La polico de dio (175).

Enhavis priesperantajn artik. kaj notojn:
Daily Herald, London, 9. 3. (pri "S-ulo"); L'Ecole Emancipée, Saumur, 11. 3.; Der Deutsche Eisenbahner (Germ. Fervojisto), Berlin, 4. 3.

Peresperantajn leterojn presis:
Neue Zeitung, München, 9. 3.; Le Drapeau Rouge, Bruxelles, 9. 3.; The Labour Woman, London, marto.

NIA POŜTO

Johannesburgaj SAT-anoj. — Koran dankon pro sendita jarlibro. — E. L.

10 449. — Ni tre deziras ricevi materialon el Usono por nia gazeto, sed tio, kion vi sendis, ne taŭgas. Priskribu vian vivon, viajn laborkondiĉojn k. s.

5583. — Pro manko de loko ni nur resume aperigas la leteron de l' klubo. Tuj, kiam loko permesas, ni daŭrigas prikluban publikigon.

10 142. — Se ni ricevos bonajn manuskriptojn pri la temo, kiun vi mencias, ni certe utiligos ilin. Ni konsilas, ke vi unue pli funde lernu nian lingvon antaŭ ol komenci traduki aŭ originale verki por publikigado.

D. Ŝ. (Minsk). — Kredeble la enhavo de la libro, kiun vi sendis, estas interesa, sed por ni ĝi similas nedeĉifreblan rebuson. Dankon tamen pro la bona intenco.

7579. — Aperos via letero. La poemo aperis en "S. R.", marto 1926. Red.

11 194. — Certe vi povas presigi koresp. anoncojn en aliaj gazetoj, sed per via koresp.ado klopodu varbi viajn korespondantojn al SAT. Adm.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

— Kvar K-doj dez. koresp. kun K-dinoj el ĉl. L, PI. Skribu al: K-do Josef Edelsbrunner, Pflanzengasse, 5, Graz.

K-do Otto Urbas, Preinsbacherstr. 77, Amstetten, dez. koresp. kĉl. L, PK, PI.

Ĉekoslovakio.

K-do Karl Wunsch, Josefsthal, 73 a p. Gablonz a. N., dez. koresp. L, PK, PM, PI, bfl. kĉl.

K-do Otto Hawelka, Ackerstr. 19, Gablonz a. N., dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PI, precipe kun ekstereŭropanoj. Tuj k. ĉiam resp.

Germanio.

— 4 junaj K-doj dez. koresp. kĉl. Adr.: K-do K. Pabst, Grimmaische Str. 37, Schmölen b. Wurzen i. Sa.

K-do Kurt Kuchinke, Grossröhrsdorf i. Sa., dez. koresp. kĉl., prefere pri sporto. Mi ankaŭ ŝakludas per koresp.ado kun eksterlandaj Gek-doj. PI, PM. Resp. garantiata.

K-do Willy Richter, Innere Bergstr. 8, Thalheim i. Erzgeb., dez. interŝ. ĉefe PM kĉl. k. koresp. pri a. temoj.

K-do Albert. Kurze, Jüdenstr. 13, Weissenfels a. S., dez. koresp. kĉl. pri div. temoj. Ĉiam resp.

— Geedzoj dez. koresp. kĉl. PI, bfl. Resp. garantiata. Adr.: K-dino Luise Wiedemann, Gartenstr. 1, Passendorf bei Halle a. S.

Sovetio.

K-dino K. Vinokurova, Leningradskoe ŝosse, 11-a versto Staropetrovskij proezd, 1, Moskvo 57, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-doj Klimuŝev, Kaminskij, Evstafev (19—23 j.), Razgulaj 2, Industrialno Pedagogiĉeskij Institut im. K. Liebknecht, Moskvo 66, dez. koresp. individue pri div. temoj. Resp. garantiata.

— SAT-peranto, K-do Gregor Akselrod, Mizikeviŝa 68, Odessa, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do Vl. S. Votorapin, p. t. K-ro, Minusinsk, Siberio, dez. interŝ. PK, PI, kĉl. Resp. garantiata.

K-do Anatolij Nikitin, Radio-stacio, Jenesjejsk, Siberio, dez. koresp. PI, PM, kĉl, precipe kun fraŭlinoj. Resp. garantiata.

Jenaj Gek-doj el rondeto de esperantistoj en Mariinsk, Tomska Siberio, dez. interŝ. PK, PI, kĉl. Resp. garantiata: G. Ĉernev, A. Ĉernev, R. Ustinova, P. Ravinskij, V. Jakovljev, T. Tarskaja, T. J. Procuk, N. Bovksij, P. Ĥromeva, A. Cimbalov, M. Marĉenko.

— Komĉelo de fervoja profesilernejo dez. koresp. kĉl. fervojistoj. Adr.: Sebastopolo, Proletarskaja 8, Jaĉejka V. Z. K. S. M.

Esp. rondeto de fervojistoj k. elektrolaboristoj dez. koresp. pri prof. demandoj, socia vivo k. a. problemoj kun samprofesiuloj. Adr.: Sebastopolo, Krimelekto al Esperanto-Rondeto.

K-do B. Ŝaber (ano de artmaldekstra fronto), str. de Trockij 11/6, Sebastopolo, dez. koresp. kĉl. pri arto k. socivivo, interŝ. interesajn PI. Nepre resp.

— Esp. rondeto el laboristoj de marfabriko, dez. koresp. pri lab. k. socia vivoj kun apartaj laboristoj k. organizoj. Adr.: Sebastopolo, Morzavod, Esperanto-Rondeto.

K-do G. Novik (ruĝa maristo), Maŝinnaja ŝkola, Kronstadt, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

K-dino Nino Ŝelomova, St. Plodorodie, Ukrainio, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

— Esperanto-rondeto de junaj lab. korespondantoj (ŝipanlernantoj), dez. koresp. kun eksterlandaj K-doj. Adr.: K-do Lustricki, Kooperativnaja 62, Samara.

— Esperantista grupeto de lab. korespondantoj ĉe redakcio de ĵurnalo "Komuna" dez. interŝ. L kĉl. Adr.: Al Esperanto-grupo, Redakcio de "Komuna", Samara.

K-do Paŭlo Tilin (oficisto), Uprazdnenij per. 17, loĝ. 34, Leningrad, dez. koresp. kĉl.

K-do Viktoro Levĉik, Moskovskaja ul. 38, linio 40-a, Lugansk, dez. koresp. pri ĉ. temoj kun tutmonda junularo.

K-do Dmitrij Voblikov, Moskovskaja ul. 38, linio 40-a, Lugansk, dez. koresp. pri ĉ. temoj kun tutmonda junularo.

— Kiu sendos al adr.: Minsk, Poŝtkesto, 33 BKSEU — 2 respondkuponojn ricevos broŝureton "Unuiĝo de Poŝto-Telegrafo k. Telefono de USSR".

K-do V. Okultoviĉ, Arseniĉeva 31/2, Kamenskoje, Dnepropetr. okr., dez. koresp. pri sporto kĉl. L, PI. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo: K-dino L. Fridman nun loĝas: Dom Promiŝlenosti, "Kustar-Samodijaĉ", Poltava (Ukrainio).

K-do E. Ŝtejn (studento), "Inĥoz", Puŝkinstr. 81, Ĥarkov, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj. Resp. garantiata.

K-do I. Moslov, Krasnoarmejskij pr. 16, Trock, Leningrad. gub., dez. koresp. kĉl. aviadistoj.

— 20 j. studento dez. koresp. kĉl. kun gejunuloj-studentoj, kom-istoj. Adr.: K-do Eŭgeno Bukatin, 1-a Moskva Universitato, Moskvo.

K-do A. N. Rusakov, Voznesenskaja 20, kv. 12, Moskvo, dez. koresp. pri kemiaj problemoj kun germ. studentoj.

K-do N. Raĉev, II, Tverskaja-Jamskaja 40, kv. 5, Moskvo, dez. koresp. pri viv- k. laborkondiĉoj en ĉl.

K-dino Z. Kalaŝnikova, fabr. dom. 20, kv. 4, Naro-Fominsk, Mosk. gub., dez. koresp. kĉl. Nepre resp.

ATENTU!

En mia jarkolekto de "S-ulo" mankas jenaj numeroj: 118, 123, 124, 125 kaj 126. Kiu K-do povas havigi ilin al mi? Mi rekompencos per japanaj esp-aĵoj. Adr.: **Joshi H. Ishiguro** (SAT 2455), Koojimaĉi P. O. Box 1, **Tokio** (Japanio).

Tutmonda Junularo

ATENTU!

Komjunula ĉelo de "Fabriko-Lernejo" deziras korespondadi kun junulaj organizoj kaj societoj ĉiulandaj, komjunulaj ĉeloj, lernejoj ktp. Helpu al ni antaŭenigi la movadon ankaŭ en nia lernejo kaj junularo. Montru taŭgecon de esperanto. Respondo garantiata. Adresu: **Kamenskoje, Dniprop. okr. Arseniĉeva str. 31-II, Sovetio "Labesko" (por F. Z. U.)**

ENHAVO:

	pago
Pri la rolo de kelkaj luteranaj sektoj	203—04
Ekzekutisto kaj viktimo	204
La unua sindikata junulara kongreso en Britio	204—05
Letero el Aŭstralio	205
El okcidenta Ukrainio	205
La benguela fervojo	205—06
El Naturo kaj Scienco	206
Al kiu apartenas la esfonto?	206
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo	206
Tago el mia vivo	207
Kelkaj memoraĵoj	207
Honorado — anstataŭ salajro	207
Tra Esperantio	208—10
Korespondado, anoncoj	209—10

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)